Esperanto Societo Frankfurto

Esperanto-Informilo

Aprilo 2026

Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Eseo
- Diversaĵoj
- Esperantaĵo
- Lasta paĝo

Foto: U. Fellmann, la 1-an de aprilo, 8:51PM, Frankfurto. “Kaj nun, laborfine, la fotoj de la vespero”.

Mesaĝo de la prezidanto:

Karaj legantoj, dum nia lasta babila rondo en Stattkafejo la ĉeestantaj klubanoj estis intervjuita kaj fotita de kunlaborantoj de la FAZ-taggazeto. Ili volis scii pri la historio de nia klubo, nia agado kaj kielmaniere oni ankoraŭ hodiaŭ profitas per lernado de Esperanto, ankaŭ kompare kun la Angla. Ni longtempe diskutis kaj nun esperas, ke informriĉa artikolo pri tio intervjuo baldaŭ legeblas en loka parto de tiu gazeto.

G. Hennemann, la 28-an de marto 2026

Kolofono:
Redaktoro teamo:
Georg Hennemann
Ulrich Fellmann
Korektanto: F.U.

c/o Georg Hennemann
Rehgartenstrasse 16
35683 Dillenburg
Tel.: 02771 8196614

Bankverbindung / bankkonto:
Esperanto-Gesellschaft F.a.M
IBAN: BE92 9051 1007 7223
BIC: TRWIBEB1XXX
bei: Wise, Belgien

Jahresbeitrag / jarkotizo:
ESF+DEB-Beitrag: 96 €
Familienmitglied: 48 €
Nur ESF: 24 €
Familienmitglied: 12 €

Programo

Unua mardo
La 7-an de aprilo 2026
ekde la 19-a horo: Sentema babilado per Zomo
Ligilo: https://meet.jit.si/EsperantoFrankfurtamMain

_____

Dua mardo
La 14-an de aprilo 2026
ekde la 19-a horo: Interna babilado per Zomo

Ligilo: https://meet.jit.si/EsperantoFrankfurtamMain

_____

Tria mardo
Surloke: Saalbau MÜZ Schönhof, Rödelheimer Str. 38, 60487 Frankfurt am Main

Dienstag, den 21. April, 2026 --- Mardo, la 21-an de aprilo, 2026

18:30 h
Lingva rondo
"Ludoj" "Spiele"
G. Schäfer

19:30 h
Vortrag Prelego
"Schwingungen und Wellen" "Vibradoj kaj ondoj"
G. Hennemann

_____

Kvara Mardo
la 28-an de aprilo
ekde la 19-a horo: „Senprograma samideana babila renkontiĝo"
Stattcafé, Grempstraße 21, 60487 Frankfurt am Mai

Bildfonto kappaĝo: Panorama vido el la 2021 rekonstruita Goetheturm en Frankfurto je Majno

By Tobias.Nicol – Own work, CC BY-SA 4.0, https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=103455745,

https://commons.wikimedia.org/wiki/Henninger-Turm#/media/File:Cityscape_Frankfurt_2021_Panorama.jpg

El la klubo

Anoncoj:

- 07.04.2026 19:00 Uhr Ni provas renkontiĝi per la jitsi-aplikaĵo
  Ligilo: https://meet.jit.si/EsperantoFrankfurtamMain
- 18.07.2026 14:00 Uhr Somerfesto en frankfurta Palma Ĝardeno (Palmengarten),
  Ni renkontiĝos en Kafejo Siesmayer apude.
  https://www.cafe-siesmayer.de/

elstara foto: “Jen mia foto de la tago”, G. Hennemann, 19-a de marto, 18:04pm promenanta en Gießen apud rivereto Wieseck. Titolo: „Fiero kastora venas post la falo“ , libere laŭ la proverbo: „Fiero venas antaŭ falo“.

Eseo – Paskofesto, ovoj, renaskiĝo, resurekto, revigligo, espero

de G. Hennemann

Pasko kaj ovo estas simboloj por novaperanta vivo, festoj, kaj ankaŭ nova ĉapitro en la ciklo de la jaro. Naturo vekiĝas el sia vintra dormo - koloroj, lumo kaj vivo revenas. Semajnojn antaŭe, paskaj ovoj estas komplekse ornamitaj, printempaj florecaj ornamaĵoj estas starigitaj, kaj malgrandaj surprizoj estas preparitaj. Prof. D-ro Christiane Tietz, Prezidanto de la EKHN (Evangelia Eklezio en Hesio kaj Nassau) diras en sia paska mesaĝo: “Pasko estas pli ol nur tradicio: ĝi estas profunde enradikiĝinta en la kristana kredo. La resurekto de Jesuo reprezentas esperon kaj novajn komencojn - potencan mesaĝon por ĉiuj, kiuj serĉas lumon en mallumaj tempoj.”

Dum pasko mi ofte rememoras la libron “Krabat” de Otfried Preußler el la jaro 1971, kiun mi legis unuafoje kiel 14-jaraĝa adoleskanto, kaj kio impresis min longdaŭra. En ĝi ankaŭ estas forta rilato inter pasko, amo kaj superado de la malbonaj fortoj, enkorpigita de muelisto kaj sia ligo kun la diablo. Ankaŭ la "Paska Promenado" en la verko "Faŭsto 1-a parto" de Goethe estas fama sceno (sekcio "Antaŭ la Pordego"), en kiu Faŭsto kaj Wagner promenas dum Paska dimanĉo. „La sceno simbolas printempon, resurekton kaj la revenon de Faŭsto al la vivo post suicidprovo dum Paska nokto. Ĝi temas pri vivĝojo kaj ligo al la simpla popolo.“ Kaj ligo al la "simpla popolo" estas temo, kiun ni Esperantistoj miaopinie ofte forgesas kaj kiun nia majstro L.L. Zamenhof tiel ofte kaj admonante rememoris: Ĉiuj de ni „Sciantoj“ estas alvokata iom pli montri sian specialan lingvan hobion kaj tiel pruvi ke Esperanto vivas kaj pluvivas. Kaj ankaŭ kun nia speciala ovo, nome nia Esperanto-Informilo, ni ja provas veki novajn fortojn esperante, ke la E-I ĉiumonate ne nur vane aperas kaj denove malaperas por malmulte da klubanoj. Kontraŭe mi deziras ke nia E-I ankoraŭ longe ekzistas en sia nuna formo kaj ke niaj membroj pli aktivas per kontribuaĵoj, replikoj, kritikoj, ideoj …

Mi povas imagi ke inter niaj membroj estas kelkaj, kiuj dumtempe kabeas, sed alikaze mi certas ke la alloga forto de esperanta lingvo ĉiam plu motivas verki kaj eksprimi sin en nia kara verda lingvo. En mia kazo estas eĉ tiel, ke Esperanto vekis en mi la intereso denove okupiĝi sin kaj lerni la rusan – lingvo, kion mi lernis dum pli-malpli unu jaro je la Slava Instituto de la Universitato en Kolonjo. Mia jam forgesis multe, sed nun legante dulingvaj verkoj mi reakiras mian malnovan scion kaj mirinde ofte trovas origine germanan vortojn en la rusa lingvo. Eble ni devus denove redakti la E-I en dulingva formo, almenaŭ parte. Kiel vi pensas pri tiu propono?

Mi deziras al vi belaj kaj pacaj paskaj tagoj.

Ich wünsche Ihnen ein schönes und friedliches Osterfest.

Желаю вам прекрасных и мирных пасхальных дней.

Fontoj:

https://www.ekhn.de/themen/ostern/oster-news/osterbotschaft-der-kirchenpraesidentin-wortlaut

https://www.kirche-im-hr.de/sendungen/hr2-zuspruch/2020/krabat-ostern-und-die-liebe-die-stark-ist-ueber-entfernung-hinweg

https://www.gedichte7.de/osterspaziergang.html

Diversaĵoj

Ŝerco :)

Edzino al sia EI-leganta edzo:
- Kial oni ĉiam atendas, ke edzinoj kuiru por siaj edzoj? Kial ne povas esti inverse?
- Edzo: Pro la leĝo.
- Edzino: La leĝo? Kia leĝo?
- Edzo: Nu, laŭleĝe, malliberuloj devas esti nutrataj trifoje ĉiun tagon.

Proverbo de la monato (elektita de Georg)

Hodiaŭ mi prezentas du proverbojn, kiuj temas pri printempo, soleco, atendado kaj libereco:

„Unu hirundo printempon ne alportas.“
„Tute libera, kiel birdo aera“.

https://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/proverbo_002508.htm
https://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/proverbo_002493.htm

Enigmo

Kiuj bestoj estis deklaritaj fiŝoj anstataŭ viando dum la Karesmo?
Kiu de vi povas nomi pli ol kvin gajnos paskan ovon ;)

https://www.evangelisches-gemeindeblatt.de/aktuelles/kuriose-fastentricks-als-der-hirsch-noch-ein-fisch-war

Esperantaĵo – Trovita en „Hazardaĵoj de Esperantujo“ marto la 14-an

Ni invitas vin pasigi la 29-an ĝis la 31-an de majo kun esperantistoj sur boatoj! 🚣 🚤
Dum tiuj ĉi tagoj okazos la tradicia esperanto-aranĝo BOATADO, dum kiu ni remos tra la laga sistemo de Palūšė, tranoktos en tendoj kaj kuiros manĝaĵojn sur tendarfajro 🤩 🔥 🏕
Venu esperantumi en naturo kun ni! 💚

Invitilo: https://docs.google.com/document/d/10Llrzw-v_W3K20XGuMTAvYPpxzlTH8VQ/edit
Aliĝilo: https://forms.gle/bQs4XFctpu52AZdk7

--

UEA subtenas la iniciaton “Monto Zamenhof”

UEA subtenas la iniciaton “Monto Zamenhof” por diskonigi Esperanton kaj la heredaĵon de Neŭtrala Moresnet. Legu pli ĉe https://sezonoj.ru/2026/02/gk-306/ kaj subskribu la petskribon.

Ĉu vi jam konas retpaĝon de David G. Simpson kun amasoj da informoj, bitlibroj, ktp. Esperanto - The International Language, http://Esperanto.DavidGSimpson.com

Kongresoj:

La franca kongreso okazos la 22-25 majo en normandio

Kaj la 84a Hispana Kongreso de Esperanto okazos la 14-18an de julio en Portugalete (Eŭskio) je 12 km norde de Bilbao. Legu pli ĉe https://sezonoj.ru/2026/03/hispanujo-9/ kaj aliĝu je favora tarifo ĝis la 31a de marto.

Михаил Михайлов Miĥail Miĥailov

(1829-1865)

Снова дней весенних	Der Lenz ist gekommen
Снова дней весенних Дождались мы: ласточки щебечут Над окном тюрьмы.	Ni denove atendis printempajn tagojn: hirundoj ĉirpas super la prizona fenestro.
Между гор зеленых Темной полосой Вьется Вдаль дорога К стороне родной.	Inter la verdaj montoj Kiel malhela strio La vojo serpentumas en la distanco Rekte al nia patrujo.

*1862

Ernst Toller

Das Schwalbenbuch

Gewachsen 1922 · Geschrieben 1923

Festungsgefängnis

Niederschönenfeld

Эрнст Толлер

La Hirunda Libro

Publikigita 1922 · Verkita 1923

Fortikaĵa Malliberejo

Нидершёненфельд

Ich stehe am nächtlichen Gitterfenster.	Mi staras ĉe la fenestro dumnokte.
Träumend zwitschert die Schwälbin. Geweckt vom liebenden Ruf Regt sich leise das Schwalbenmännchen.	La hirundo pepas reveme. Vekita de ŝia ama krio, la vira hirundo moviĝas milde.
Ich bin nicht allein.	Mi ne estas sola.
Auch Mond und Sterne sind mir Gefährten Und die schimmernden schweigenden Felder.	La luno kaj steloj ankaŭ estas miaj kunuloj, Kaj la brilantaj, silentaj kampoj.

* La germanaj legantoj eble komparos tiujn simplajn liniojn de politika batalanto kiu pereis en Siberio kun la "La hirunda libro" de Ernst Toller, verkita en malliberejo en 1924. La aresto kaj kondamno de Miĥailov estis la unua politika proceso de la 1860-aj jaroj kaj kaŭzis grandegan eksciton inter rusaj intelektuloj.

Fontoj: Rusaj poemoj dulingvaj, Rusa/Germana, Reclam Universal-Bibliothek Numero 18609
http://www.lyrik-lesezeichen.de/schwalbenbuch/
https://www.literatisch.de/ernst-toller-das-schwalbenbuch.html